

# TEA-BULTENO

13<sup>A</sup> JARO

JANUARO - FEBRUARO 2010

NUMEROJ 1-2

Ni lernis flugi kiel birdoj, naĝi kiel fiŝoj, sed ankoraŭ ni ne lernis vivi kiel fratoj.  
*Martin Luther King (1929-1968)*

## Kara Legantaro,

unue mi deziras al vi ĉiuj bonan, sukcesan, fruktodonan kaj sanoplenan Novan Jaron!

Nu, 2009 estas jam for, sed tiom da okazaĵoj buntigis ĝin, ke ĉifoje, en la kutima malferma parolado jarkomence, mi devas retrojeti rigardon al pasinteco kaj preparoli pri okazintaĵoj, kaj ne pri okazontaĵoj. 2009 estis jaro de intensa celebrado, pro la 150-naskiĝdatreveno de nia Majstro. Ĉie tra la mondo, diversmaniere esperantistoj festis, festadis per grandaj aŭ etaj eventoj, per atentoaltiraj aŭ modestaj manifestacioj: ĉiu laŭ sia povo, sia inventemo, kaj precipe laŭ sia propra poŝo!

En Triesto – certe ĉiu leganto estis informita pri tio – okazis du aranĝoj: la unua, ekspozicio kun titolo "Antaŭ 150 jaroj naskiĝis Lazaro Ludoviko Zamenhof", ĉe komunuma Salono "A. Fittke", malantaŭ la urbo-domo. Ĝi estis inaŭgurita la 20<sup>an</sup> de novembro kaj finiĝis la 8<sup>an</sup> de decembro. Malgraŭ veteraĉo (ĉiam pluvo kaj pluvo kaj malvarmo!) kaj la alproksimiĝantaj Festotagoj, kio certe deturnis la atenton de granda parto de nia civitanaro malgraŭ publikigo de pluraj anoncoj en ĵurnaloj kaj retejoj de niaj urbo kaj regiono, tamen vizitantoj estis nombraj: pli ol 600 personoj! Interese ke ni ricevis multe da komplimentoj, fare de vizitintoj, pro la atentokapta kaj konciza prezentado, kaj pluraj esprimis sian dankon pro la eblo konatiĝi kun tiel grava personeco, pri kiu malmulte, ĝenerale, oni scias. Post tio, je la 10<sup>a</sup> de decembro, ĉe la Muzeo de Juda Komunumo de Triesto "*Carlo e Vera Wagner*", kunveno, nome serio de prelegoj, per kiuj la aŭtoroj – laŭ diversaj vidpunktoj – prezentis L. L. Zamenhof-on, kaj ankaŭ la figuron de Klara Silbernik-Zamenhof, pri kiu malmulton oni scias, malgraŭ ŝiaj altvaloraj subteno kaj sindediĉemo al Ludoviko, dum ilia kuna vivo.

En pluraj italaj urboj okazis prelegoj, renkontiĝoj, seminarioj ks, plej ofte kun prezentado de la libro "Via Zamenhof" de Roman Dobzryński en la traduko de Michela Lipari kaj Filippo Franceschi, dum fine, je la 15<sup>a</sup> de decembro aŭ ĉirkaŭ tiu dato, en pluraj lokaj grupoj, laŭtradicie, oni rememoris diversmaniere la iniciatinton de la lingvo internacia Esperanto.

Mi havis la ŝancon ĉeesti "Zamenhof-Tago"-n ĉe la Centro Esperanto Torino, la 14<sup>an</sup> de decembro. Prof-ro Fabrizio Pennacchietti prelegis pri la deveno de la familia nomo "Zamenhof", treege interesa kaj kleriga, dum s-ino Pierisa Cavallero legis rakonteton "Ludoviko kaj mi..." pri sia rilato kun d-ro Esperanto. Ĝi ŝajnis al mi tiom bela, tiel inda je diskonigo, ke mi ne povis atendi la finon de 2010<sup>a</sup> jaro por ĝin publikigi okaze de koncerna Z-tago: bonvolu ĝin legi, mi atendas vian opinion! Dolĉe finiĝis tiu vespero, tre dolĉe, ĉar fakte ni gustumis la "Papavan kukon", ankaŭ preparitan de Pierisa, kies recepton vi trovas je 3<sup>a</sup> paĝo. Ĝin oni povas surtabligi en ĉiu ajn tago de la jaro, oni ne devas atendi la 15<sup>an</sup> de decembro, eĉ dum la jara Asembleo oni povas per ĝi plezurigi la ĉeestontaron: bona ideo, ĉu ne? Ni dolĉigu nian vivon kiel eble plej: tio forgesigas la maldolĉajn momentojn... Ree, Bonan Novjaron al ĉiuj de

Via redaktanto

## LUDOVIKO KAJ MI...

La poŝtisto venas ĉiam je la deka horo... Ni kutime festas dum la karnavalo: lernejoj estas fermitaj.

Mi ĵus finas ellatinan tradukon de Cezaro kiam ĉe la pordo oni longe sonorigas. La poŝtisto tenas en la mano flavetan eksterlandan koverton. Ĝi venas el germana kazerno ĉe la Konstanca lago sed la skribinto estas iu "maljuna" dudekjarulo franca militdeĵoranta.

Al mi, juna gimnaziano, li ŝajnas iomete kurioza. Fakte li skribas, prezentante sin: "... mi ŝatas fremdajn lingvojn, krom la franca, mi scipovas Esperanton, germanan kaj iomete la italan..."

"Kio diable estas esperanto? Mi ankaŭ lernas, krom la antikvaj klasikaj lingvoj, la anglan, francan kaj germanan lingvojn..." - skribas al li mi, kiu cetere ĉiam interesiĝas pri ne ordinaraj uloj...

Ni interkorespondas france kun kelke da aldonoj itale kaj germane.

Kompreneble mi estas tre scivolema pri tiu ne kutima lingvo esperanto. Neniam antaŭe mi konis strangulon tiel parolantan.

Kiel ĉiu respektinda esperantisto li informas min per kelkpaĝa letero pri la internacia lingvo iniciatita de iu pola okulisto Ludoviko Lazaro Zamenhof en 1887 ktp ... ktp... ktp.

Mi avide legas liajn notojn detalajn, ekvizitas kaj esploras bibliotekojn urbajn kaj, tute hazarde, promenante tra strato *Po*, mi albatigas en Italian Esperanto-Federacion.

Ankoraŭ hodiaŭ mi rememoras pri tiu malhela nigra ŝtuparo iom malkvietiga, kondukanta al la verda celo. Malantaŭ la vitra pordeto mi trovas sinjorinon Klaŭdja Smeriglio kaj fraŭlinon Maria Frus.

Ambaŭ ili plenplenigas miajn manojn per flugfolioj, informiloj kaj korespondpetoj el pluraj eŭropaj landoj. Per mia magra buĝeto mi aĉetas gramatikon kaj du etajn vortarojn. Maria kaj Klaŭdja omaĝas min per bildkarto kun severa sepia portreto de Lu-

doviko kaj malgranda rinda insigno kun verda stelo por la blanka kolumo de mia bunta bluzo.

Tiel, fiere mi eliras kaj promenas tra strato *Po* kun Ludoviko inter la brakoj, meze de miaj libroj. Hejme mi klopodas legi la leterojn en la belaj afrankitaj kovertoj: ne facilas, ĉar la personaj skribmanieroj ne klaras, kaj la lingvokonoj terure lamas; mi komprenas tamen ke sur la skribotablo kuŝas skribaĵoj de ĵurnalisto el Kievo, librotenisto el Helsinki, biologo el Minsk kaj profesoro el Madrido. Duono de Eŭropo deziras kontakti iun en Torino kaj tiu iu povus esti mi! Mi sentiĝas nekredinde granda kaj fiera!

Dum kelkaj tagoj mi lernas kaj lernas, ŝajnas al mi preskaŭ ĉion kompreni, almenaŭ pasive: mia entuziasmo tuŝas la stelojn kaj eĉ pli alten...

Alvenas subite por mi gravaj familiaj problemoj kaj mi devas flankenmeti la zamenhofan aferon. Daŭre mi korespondas france kun la unua esperantisto de mia vivo. Ŝajne ankaŭ li havas malfacilaĵojn privatajn, tamen, senĉese, li priskribas siajn esperantajn renkontiĝojn internaciajn ĉe UEA- kaj TEJO-kongresoj.

La portreto de Zamenhof ĉiam estas en mia gramatiko kiun mi ne trafolumas dum longa tempo. Foje mi uzas Ludovikon kiel paĝosignon de libro, de mi momente legata. Estas tiel ke nia Majstro sekvas miajn literaturajn gustojn, de klasikuloj ĝis modernaj aŭtoroj.

"Ĉu estas foto de iu via praavo?" - demandas iam mia kolegino Silvana, rimarkinte ĝin.

"Io simila estas..." - respondas mi eviteme.

"Li aspektas serioza kaj tamen bonanima" - aldonas ŝi post longa observado de la portreto.

"Efektive vi pravas... Li nomiĝas Ludoviko Lazaro Zamenhof... Idealisto, li iam vivis en Pollando kaj multon faris por la homa interkomprenado..." - respondas mi entuziasme.

"Ĉu vere? Ĉu pro tio vi promenas ĉiam kun li? Certe vi alte taksas lin! En mia familio, laŭ mia scio, neniu tiom alten flugis..."

Kaj mi fieras kaj fieras...

Post kelkaj jaroj definitive mi esperantiĝas kaj fakte plenrajte filiniĝas en la verda rondo familia.

Kaj Ludoviko Lazaro promenas ĉiam kun mi.

Ĝuste morgaŭ ni blovestingos centkvindek kandeletojn por li...

Kaj mi volas imagi lin, dum li ridetas rajdante sur verda edena nubeto kaj pensas al tiu decembra vespero de 1878, kiam, sidanta kun samlernejanoj – fidelaj kolegoj – antaŭ la patrino papava kuko, li festis la vivigon de sian Lingve Universalan, kanta-te kune kun ili: "Malamikete de las nacies, kadò kadò, jam temp' està". La prapatrino de nia esperanto ja longe marŝadas kaj prosperas. Kaj li, kortuŝita, rememoras... pri la vortoj de "La Vojo":

"Cent semoj perdiĝas / Mil semoj perdiĝas. / Ni semas kaj semas konstante..."

Kaj kiel forgesi la vortojn de la juna amiko Edmond Privat:

"... Sed la vera ĝojo lin atendis en Bulonjo. Tie li renkontos fratojn ĉiulandajn: tiel li troviĝos en rondo familia... Flue kaj facile flugis la paroloj de lipoj al oreloj. De svedoj al italoj ... falis, falis muroj inter la popoloj..."

Kaj ankoraŭ nun li sendube emociiĝas por la kunvenintoj de la Bulonja kongreso:

"Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj kiuj kunvenis el la granda tutmonda familio... Sankta estas por mi la hodiaŭa tago ... ĉar hodiaŭ kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj... Benata estu la tago, kaj grandaj estu ĝiaj sekvoj... Nun de loko flugu ĝi al loko... sur flugiloj de facila vento..."

Kaj nur la Ĉielo scias kion li ankoraŭ povas plani sur tiu verda edena nubeto, por pacigi la mondon... Eĉ hodiaŭ kiom da leteroj al la mondaj respondeculoj por montri la rektan vojon li povintus sendi! Certe al li ne mankus la kuraĝo!

Mi ne scias, kiom da esperantistoj ĝisfunde konscias pri la grandeco de Esperanto, pri la eblecoj kiujn ili posedas danke al la senĉesa laboro de iu pola okulisto kiu kuracis, kaj ne nur fizike, la okulojn de la homaro, por ke ili povu vidi "eĉ guton malgrandan, konstante frapante, trabori la monton granitan."

Rilate min, mi ĉiam fieras promenante kun la sepia portreto de Ludoviko kiel paĝosigno... Multajn esperojn junulinajn mi perdis survoje, sed la afero Esperanto pluvivis, pro tio mi ĝojas festi kun vi tiun ĉi centkvindekan datrevenon de tiu "mia" verda familiano.

Bondezirojn al vi, Ludoviko, kaj dankon pro la grandvalora heredaĵo kiun vi lasis al ni! P.C.



## Dankon al Guglo!

La serĉilo Google relative ofte modifas la aspekton de sia logotipo en la ĉefa serĉopaĝo depende de la sezonaj festotagoj en diversaj partoj de la mondo. Por uzi la ŝancon, esperantistoj dise en la mondo turnis sin al la firmao por peti, ke ĝi

ne forgesu la 150-jariĝon de la iniciatinto de Esperanto. Unu el la unuaj propagandantoj, la israelano Josi Shemer, jam la 24<sup>an</sup> de septembro dissendis al multaj adresoj mesaĝon kun klarigoj kiel peti tion. Pluraj akceptis lian proponon, interalie ankaŭ Renato Corsetti, kiu disvastigis la ideon en la diskutlistoj de UEA.

La 14<sup>an</sup> de decembro, je la 21.30, laŭ la universala horo, la Esperanta flago videblis en la ĉina, japana kaj korea versioj de Google. Tamen, ekzemple, la barata, kazahia kaj rusia versioj de Google tiutempe ne montris la Esperantan flagon, kvankam en la koncernaj landoj jam komenciĝis la 15<sup>a</sup> de decembro.

Tie, kie aperis la Esperanta flago, ĝi enhavis ankaŭ ligan al serĉrezultoj pri Esperanto. Tiel, sekvante la flagon en la ĉinlingva paĝo, oni povis trovi kronologion pri la historio de Esperanto, dum la japana versio gvidis ekzemple al la japanlingva Wikipedia artikolo pri Esperanto kaj japanlingvaj lerniloj.

Eblas vidi ankoraŭ la bonegan kaj belan omaĝon kaj oni povas esprimi sian kontenton per voĉdono, alklakante, en la retejo <http://doodlewatch.com/>, la nombron de steloj sub la logotipo kaj eĉ lasi vian komenton.

En Italio tio jam donis siajn unuajn rezultojn: alvenis multnombraj aliĝoj al la reta kurso ĉe <http://iej.esperanto.it/kirek>. Dankon, Guglo!

Laŭ [<http://www.liberafolio.org>] - sendependa movada bulteno Fonto: Ret-Info <http://www.eventoj.hu>

## Zamenhofaj festoj en...



... Herzberg am Harz

### La Esperanto-urbo en Germanio

La 15<sup>an</sup> de decembro estis inaŭgurita monumento al Ludoviko Zamenhof en ĉeesto de ĉ. 70 homoj. Sur ĝi la tekstoj estas en la kvar lingvoj: germana, ĉina, pola kaj Esperanto. La blanka marmora busto kun nigra postamento estis pretigita en Ĉinio, la starigo sponsori-

ta de Esperanto-amikoj, kluboj el la tuta mondo. Koran dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis al la realigo de tiu projekto!

Fotoj estas videblaj pri la inaŭguro kaj la festprogramo en la kavalira salono de la kastelo. Bv. rigardi la fotoalbumon ĉe [http://esperanto-urbo.de/gallery.php?gallery\\_id=18066033](http://esperanto-urbo.de/gallery.php?gallery_id=18066033).

### ... Francio

Etsuo Miyoshi estas fama japana esperantisto, prezidanto de sia prospera firmao Swany, kiu en la lastaj jaroj multe kaj signife kontribuis al diskonigo de Esperanto per financado de tutpaĝaj reklamoj de la plej legataj gazetoj en deko de eŭropaj landoj. Lige al la 150<sup>a</sup> jubileo de naskiĝdato de Zamenhof li denove subvenciis aperigon de tutpaĝa Esperanto-reklamo, ĉi-foje en la gazeto "Le Monde" en Francio. La tutpaĝa reklamo estas videbla ĉe: <http://www.ipernity.com/doc/32119/6831740>

## MEDIO: BIODIVERSECO DE NATURO AL PLI BONA VIVO

"Ni reiru al naturo, por plibonigi la vivon" – tiu ĉi frap-frazo estos la emblemo de 2010 – Internacia Jaro de Biodiverseco. La Internacia Unuiĝo pri Konservado de Naturo (*IUCN, International Union for Conservation of Nature*) lanĉas alvokon por ke oni eltrovu en 2010 konkretajn solvojn cele protektaĉon de la naturmedio, de kiu la tuta homaro dependas. Tiu institucio klopodas antaŭenigi senprokrastajn intervenojn por gardi la speciojn, ekosistemojn kaj naturajn rimedojn, antaŭ ol estu tro malfrue.

En 2010 oni devus atingi gravan alvenpunkton, kies celo estas malebligi kromajn specio-perdojn, malgraŭ ke ĝis nun la rezultoj estas malsuperaj ol la antaŭvidoj. Tial la Internacia Unuiĝo postulas pli rigoran Konvencion pri biodiverseco por gardi la surteran vivon, en ties ajna formo. Laŭ la ĝenerala direktoro de IUKN, Julia Marton-Lefevre, "se taŭge mastrumataj, la naturaj rimedoj estas fundamentaj por eltenebla evoluado, por subteni la komunumojn, por kuraĝigi ekvilibrantan ekonomian kreskon kaj kontribui al redukto de malriĉeco. Defendo de biodiverseco protektas la nemalhaveblajn rimedojn, kiuj estas bazaj por la tutmonda ekonomio". Vere alarmiga estas la aserto de la direktoro pri konservado de biodiverseco, Jane Smart: "Ni staras antaŭ granda danĝero: la risko de definitiva malapero en la mondo de ĉ. 21% da mamuloj, 27% da koraluloj, unu amfibio el tri kaj unu birdo el 8. Krome oni devas konsciigi, ke tia forviŝo estas neinvertigebla kaj nereparebla. Perdo de tiu naturo diverseco, kiu kuntenas la planedan vivon, serioze mina-


Tiel mi kuiras!  
Kaj vi?

## PAPAVA KUKO

Preskaŭ la tuta Bulteno informas pri eventoj jam pasintaj, sed - kiel dirite ĝi komence - la legantaro devas toleri pli ol normale ĉi malaktualajn novaĵojn, ĉar tro grava estis la pasinta jaro, kaj ĉefe la decembra monato, pro la jubilea datreveno de nia Majstro. Kaj absolute ne povas manki, ĉe la bultena kuirangulo, la recepto de la preferata dolĉaĵo de nia Ludoviko. Tre verŝajne, tiun ĉi kukon ameme bakis por li la patrino Rosalja, la 15<sup>an</sup> de decembro 1878, kiam - kune kun tri siaj samlemezanoj - li festis, krom sia naskiĝdatreveno, ankaŭ la naskiĝon de la Lingve Universal. Jen ĝi: do, notu ĉi recepton kaj kiam en via grupa sidejo oni honoros Zamenhofon per diversaj memorprelegoj, vi proponu ĉi bongustaĵon al la kunvenantoj: tutcerte - poste - vi ankaŭ estos tre festata!!!

### INGREDIENCIOJ

- 4 ovoj
- 100 g da pulvorsukero
- 50 g da sukero
- 125 g da butero
- 2 kuleroj da kakaopulvoro
- 160 g da papavsemoj
- trititaj migdaloj (k.b.)
- raspita ŝelo de citrono



### PREPARADO

Antaŭvarmigu la fornon ĝis 170 gradoj. Buterumu rondan kukujon. Disdividu la ovo-flavojn de la -blankoj: ŝaŭmigu la ovoflavojn per la pulvorsukero, kaj poste aldonu la moligitan buteron kaj citronan raspitaĵon. Kunmiksi zorgu la tuton. Laste enmetu du kulerojn da kakaopulvoro. Ŝaŭmigu ankaŭ la ovoblankojn, aldonante tre delikate iom-post-iom la sukron. Post tio, verŝu la papavajn semojn en la unuan miksaĵon kaj zorgu prilaboru ĝin. Aldonu fine la ŝaŭmitajn ovoblankojn. Disŝutu la kukujon per duono de la trititaj migdaloj, ĝis kovri la fundon, kaj poste enverŝu la paston. Tiam surkovru la tuton per la ceteraj migdaloj. Baku la kukon ĉirkaŭ 70 minutojn. Elfornu kaj ĝin malvarmigu en la ujo mem. Surŝutu ĝin per pulvor-sukero. Bonan apetiton!

cas la tutan homaron, nune kaj estontece". "Fakte," aldonas Neville Ash, estro de ekosistema programo ene de la Unuiĝo IUKN: "biodiverseco estas la fundamento de la tuta vivo surtera. Ni bezonas konkretajn agadojn kaj subtenan politikon por konservado de specioj, por mastrumado kaj restarigo de la ekosistemoj, inkluzive de la protektitaj areoj kaj vastaj pejzaĝoj, por antaŭenpuŝi subteneban uzadon de la naturrimedoj".

Sed ne nur biodiverseco estas minacata en nia mondo, ankaŭ la kulturdiverseco serioze riskiĝas pro malhaltigebla tutmondiĝo. Fakte, la imperiismo de ununura lingvo - en komerco, sciencoj, internaciaj institucioj - endanĝerigas la malfortajn lingvojn, kies rekta konsekvenco estas malapero de la koncernaj kulturoj. Interkomparado de kulturoj estis/estas/estos ĉiama kerno de progreso kaj civilizo: ekzemple, ni nur pripensu rilatojn inter la helena kaj romia kulturoj.

Esperanto estas taŭga ŝirmilo kontraŭ tiu danĝero. Nia devo estas primediti kaj konforme agi. Daŭre.





# Triesto kaŝita

## La unua Sukurejo

Tiu terura incendio de Ringtheater en Vieno, kaŭzinta, en 1881, centojn da viktimoj, sentigis la neprecon organizi sukuran servadon por la civitanaro. La katastrofo evidentigis la mankojn de socio, jes, plene evoluanta sed ankoraŭ sena je tiuj necesaj strukturoj de publika protektado. Tuja interveno, efika kaj bone kunordigita, kaze de neantaŭvidebla subita malfeliĉiga evento, povas redukti la nombron de suferantoj. Pro tio en la aŭstria ĉefurbo estis fondita, fare de Barono Mundy la unua Volontula Societo pri Sukurado. Tuja posta konsekvenco estis la apero en Triesto de simila strukturo. La unua Kuracista Distrikto, funkcianta senhalte, estis starigita en 1883 de d-ro Davide d'Osmo, kiu krom favori tiun agadon, eĉ sin proponis kiel "laboristo" ĉe la "Konstanta Nokta Kuracista Servo", kiu iom pli poste estis plifortigita kaj fine renomita, en 1886, "Poliambulatorio", ĝuste en la tragika momento kiam eksplodis tra la tuta urbo ĥolera epidemio. La Poliambulatorio, private iniciatinta de aro da volontulaj kuracistoj, certigis la unuan bazan kuracadon kaj ĉefe la transporton de la vunditoj kaj/aŭ malsanuloj, per speciale ekipitaj ĉaroj, al la malsanulejo.



Sidejo de la unua sukurejo estis en *Androna del Moro*, pli-malpli lokita ĉe la nuna *Corso Saba*. En 1888 ekfunkciis ankaŭ la telefonaj linioj, tiel ke tiu Poliambulatorio - intertempe alinomita "Sukurejo", fariĝis ĉiam pli bone organizita kaj efika strukturo. En 1890 la Komunumo donacis monsumon por realigi servon de portlitoj ĉe la apotekoj kaj por instrui la urbajn policianojn kaj fajrobrigadistojn pri la bazaj metodoj pri sukurado.


En 1905, tie estis akceptitaj kaj kuracitaj eĉ pli ol 15 mil pacientoj: inter tiuj ankaŭ James Joyce, ricevinta prizorgadon kuracistan (1907) pro reŭmata febro.



La diurne funkcianta ambulatorio estis lokita en magazeno de placo Sankta Johano, teretaĝe de la konstruaĵo je n-ro 6, dum la ĉefsidejo troviĝis en strato Sankta Francisko n-ro 3 en la tiam tute nova palaco, laŭ Florenc-renesanca stilo, kiu nuntempe estas komplete malzorgita.

## Malgaja datreveno

La eminenta prelato, kiun la Triesta Komunumo bonvolis eternigi, en 1862, metante ties bronзан buston sur la fasado de la Katedralo de Sankta Justo, nomiĝis Andrea Rapicio (*Rapiĉo*). Naskita en



Triesto (1533), li estis la dua filo de la nobela familio Rapicio, iam Ravizza. Elektita en 1565 urba episkopo, per "vortoj kaj faktoj" li sin fordonis klopodante repacigi la inter si luktantajn partiojn, kun espero je finfina paca kunvivado. Tiucele li invitis la reprezentantojn de la "malsamideanoj" je oficiala vespermanĝo jarfina. Dum la manĝo, laŭŝajne pro eraro, li eltrinkis venenitan vinon, kiu probable estis destinita al unu el la estroj de la oponantaj partioj. Kelkajn minutojn poste li mortis, meze de tiu solena festo, en konsterno kaj surprizo ĝenerala. Estis la 31<sup>a</sup> de decembro 1573!

Andrea Rapicio estis inteligenta klerulo. Juristo kaj literaturisto, li verkis precipe latine. Post lia morto lia familio foriris al Istrio kaj ekloĝis en impona kastelo apud *Pisino*, kiu estis komplete detruita dum la dua mondmilito.

ESPERO ESTAS LA LASTA HU MORTO, NI TIGI ĈAM AĜERTIS, KAJ NI KUNIAJ KONTROLOJ VITAL, NI ANKI ADOS NI, TIO KAJ NI KAMPITO ĈAM NIKI, AKTOR-ĈAMUONTO...



## Alia komikslibreto en esperanto

Daniele Binaghi estas la estro de projekto RoMEo, kiu okupiĝas pri esperantigo de bildstriaĵ libretoj. En 2007 li sukcesis eldoni Rat-Man, dum en 2009, Diabolik - la Reĝo de la Teroro (vd. TEA-Bultenon septembro-oktobran). Ambaŭokaze temis pri kuneldonoj, inter IEJ (Itala Esperantista Junularo) kaj alia asocio (unue JEFO, el Francio, poste IEF, el Italio).

Kune kun la eldonejo Edistudio, el Pizo, kaj IEJ, li intencus eldoni novan komikslibreton venontjare, verŝajne je la somera komenco; ĝi enhavus bildrakontojn de Lupo Alberto, la blua besto inventita de la italo Silver, kiun certe vi ĉiuj konas.

Ĉar Lupo Alberto jam estis eldonita ankaŭ eksterlande (ekz, en Hispanio, Francio, Germanio, Grekio), oni estas certa pri ĝia sukceso ankaŭ en Esperantujo. Tial Binaghi serĉas kuneldonanto(j)n, por kunpartigi produktadajn kostojn, vendadon kaj, kompreneble, gajnojn: dum la unuaj 8 monatoj, el Rat-Man estis venditaj pli ol 750 ekzempleroj, donante gajnon al la du kuneldonantaj asocioj. Ne bezonatas granda sumo (ĉiu kuneldonanto por Diabolik pagis 1000 eŭrojn, kaj ricevis komiksojn kontraŭ malpli ol duono de ilia vendokosto - tio signifas ke, vendante duonon de sia stoko, oni jam repagas la kostojn).

Pro tio Daniele turnas sin al italaj grupoj/asocioj per ĉi propono: kaze de interesiĝo, li estas je dispono por ĉiu ajn klarigo. Informojn eblas ricevi ĉe <http://www.pecorElettriche.it/Esperanto/RoMEo>

# Tie kaj tie pluketante...

IRINA BOKOVA KALKULAS  
PRI SUBTENO DE UEA

La nova ĝenerala direktoro de UNESKO, la bulgara diplomato s-ino Irina Bokova, sendis dankleteron al UEA pro la gratuloj, kiujn prezidanto Probal Dasgupta direktis al ŝi okaze de ŝia elekto al la grava ofico. "La konfido montrita de vi al mi estos valora fonto de kuraĝigo en mia klopodado antaŭenigi, per konkretaj agoj, la idealojn kaj celojn entenatajn en la Konstitucio de UNESKO", ŝi skribis.

Al sia letero, la Ĝenerala Direktorino aldonis la tekston de sia parolado en la ceremonio, en kiu ŝi estis enoficigita. En la parolado ŝi prezentis sian vizion pri la rolo de UNESKO kaj pri ĝia agado por respondi al la defioj kiujn ĝi alfrontas. "Ĉe la akcepto de miaj devoj mi estas plej dankema sciante, ke mi povas kalkuli pri via subteno kaj pri daŭra partnereco kun Universala Esperanto-Asocio. Miaflanke mi povas certigi vin, ke mi faros mian plejeblon por plu akceli la eksterordinaran kunlaboron, kiun UNESKO ĝuas kun via Organizaĵo."

La letero de s-ino Bokova estis datita la 9<sup>an</sup> de decembro. Tiu dato situas inter la datrevenoj de du mejloŝtonaj eventoj okazintaj antaŭ 55 jaroj: la 8<sup>an</sup> de decembro 1954 UNESKO starigis konsultajn rilatojn kun UEA kaj la 10<sup>an</sup> de decembro 1954 ĝia 4<sup>a</sup> Ĝenerala Konferenco en Montevideo adoptis la faman rezolucion pri Esperanto.

## BONVENON AL LA LANDO DE L'ETERNA ĈIELO!



Tiel titolas la Unua Bulteno de la 6<sup>a</sup> Azia Kongreso de Esperanto, okazanta de la 19<sup>a</sup> ĝis la 23<sup>a</sup> de junio 2010, en la Mongolia ĉefurbo Ulanbatoro. Laŭ la provizora programo oni organizos antaŭ- kaj postkongresajn ekskursojn, respektive

de la 16<sup>a</sup> ĝis la 18<sup>a</sup>, kaj de la 23<sup>a</sup> ĝis la 28<sup>a</sup> de junio. Ĉu maltrafi tiun ĉi preskaŭ unikan ŝancon? Imagu: tutsemajne kunrestadi kun azia samideanaro, aŭskulti ilian rakonton pri propraj kulturo, kutimoj, tradicioj, interŝanĝi spertojn pri esperantagado, konatiĝi kun novaj amikoj, viziti tute malkonatan mondon... mergiĝi ĝis la kolo (ne pli supre, ĉar alimaniere oni sufokiĝas!) en tutesperanta etoso! Kiom da novaj vivospertoj vi povus akiri, kiom da travivaĵoj vi povus rakonti al viaj genepoj antaŭ la kameneto dum vintraj vesperoj, kiam vi estos maljuna... Nu, vizitu la ttt-ejon [www.mongolio.info](http://www.mongolio.info) aŭ [www.esperanto.mn](http://www.esperanto.mn), informiĝu, rigardu la filmetojn kaj fotojn, jam nun konatiĝu kun la diversaziaj aliĝintoj... Memoru: unika okazo!

Kaj se jam tio sufiĉas por ke vi konvinkiĝu, nu komencu lerni la mongolan lingvon, kio certe utilos kiam vi deziras alparoli la lokanojn:

Demando: «Сайн байна уу?» – «Sajn bajna uu?»

Respondo: «Сайн, сайн байна уу!» – «Sajn, sajn bajna uu!».

Kio signifas? Se vi estas scivolema, iru al la supreindikitaj ttt-ejoj kaj mem malkovru, ĉu temas pri ĝentilaĵoj aŭ pri fivortaĉoj...

Ne frakasu nun vian ŝparporketon, faru tion ontjare, kaj per ties enhavo pagu la flugadon al... Ulanbatoro!!! Ĝis la en Mongolio!!!

## FAVORPREZE FLUGI AL HAVANO

Cubana de Aviación kaj Copa Airlines estas la oficialaj flugkompanioj de la 95<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto en Havano (17-24/07/ 2010). Ambaŭ ofertas favorajn prezojn al la kongresanoj. La oferto de Cubana de Aviación inkluzivas flugojn al Havano el 5 urboj en Eŭropo kaj 13 urboj en Ameriko, dum Copa Airlines flugas el diversaj urboj en Centra kaj Suda Ameriko kaj la Kariba regiono. Pli detalaj informoj troviĝas en la januara numero de la revuo Esperanto kaj en [www.uea.org/pdf/flugreklamilo\\_havano.pdf](http://www.uea.org/pdf/flugreklamilo_havano.pdf)

## Januara Programo

8 vendredo	18h00 - Epifania Koncerto - Salono Beethoven - Via Coroneo 15
11 lundo	17h30 - Unuagrada kurso
12 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo 19h00 - Renkontiĝo kun novkursanoj
15 vendredo	20h00 - Videofilmo pri Itala Kongreso en Cassino (2009)
18 lundo	17h30 - Unuagrada kurso
19 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
22 vendredo	20h00 - Esperantaj legaĵoj
25 lundo	17h30 - Unuagrada kurso
26 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
29 vendredo	20h00 - TV Bjalistoko

## Februara Programo

1 lundo	17h30 - Unuagrada kurso
2 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
5 vendredo	20h00 - UEA viva - filmo
8 lundo	17h30 - Unuagrada kurso
9 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
12 vendredo	20h00 - Venontaj Kongresoj: Mongolio, Kubo, Lignano Sabbiadoro...
15 lundo	17h30 - Unuagrada kurso
16 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
19 vendredo	20h00 - Esperantaj legaĵoj
22 lundo	17h30 - Unuagrada kurso
23 mardo	17h00 - Posttagmeza renkontiĝo
26 vendredo	20h00 - Ni traduku kune...

**Ndlr:** Kio estas Bulteno? Paĝo 180<sup>a</sup>, NPIV - Perioda, ne ĉiam regule aperanta, informilo de ŝtato, de societo, de fakuloj ks.  
Ne prikomentindas, ĉu ne? Ĉar tute laŭ-NPIV-e mi kondukas, nu vi ne rajtas plendi/grumbli/protesti pro ĝia eventuala malfruo! Bonan Novan Jaron!

*Kelkaj anoncoj/informoj fontas el RET-INFO EVENTOJ, GAZETARAJ KOMUNIKOJ DE UEA*

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO  
**Redaktanto:** Elda DOERFLER - [testudo.ts@gmail.com](mailto:testudo.ts@gmail.com)  
**Sidejo:** Via Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21  
**tel:** (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936  
**Reto:** [esperantotrieste@yahoo.it](mailto:esperantotrieste@yahoo.it); [nored@tiscalinet.it](mailto:nored@tiscalinet.it)  
**Grupa ttt-ejo:** [it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina](http://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina)  
**Poŝta adreso:** CP 601 Trieste Centro IT-34132 Trieste - Italio  
**Poŝtĉekkonto** N° 10834349

# ORDINARA JARA ASEMBLEO DE TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉon la 7<sup>an</sup> de februaro 2010 je la 10h00 en unua kunvoko kaj respektive je la 10h30 en dua kunvoko**. Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro de partoprenantoj.

## TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2009:
  - a) Morala raporto de la prezidanto (*Edvige Ackermann*)
  - b) Agadraporto de la sekretario (*Elda Doerfler*)
  - c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto (*Giuseppe Valle*)
  - ĉ) Raporto pri la libro-fako (*Giuseppe Valle*)
  - d) Deklaracio de la revizoroj (*Amalia Zerpini - Elio Nocent*)
  - e) Raporto de la triesta katedro (*Elda Doerfler*)
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

## DELEGILO

La asocio \_\_\_\_\_

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon la 7<sup>an</sup> de februaro 2010.

Subskribo \_\_\_\_\_

Dato \_\_\_\_\_

### **Notu bone!**

Okaze de la Asembleo eblos pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEI- kaj UEA-membrecoj, abonojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras abon-pagojn de LA GAZETO kaj membro-kotizojn de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista—Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj).